

La "teozofia" preĝo de Sankta Francisko el Asizo

Herbert A. Welker

Tiu preĝo estis atribuita al Sankta Francisko el Asizo, sed nur pro tio, ke ĝi estis publikigita – anonime en 1912 en Parizo en la franca – kune kun bildo de la sankto.

La franclingva originala teksto estas aldonita ĉi-sube.

En la esperanta Vikipedio (en la artikolo pri Sankto Francisko el Asizo) la preĝo tekstas tiel:

Sinjoro, faru el mi ilon por via paco; kie estas malamo, permesu ke tie mi semu amon; pardonon, kie estas ofendo; fidon, kie estas dubo; veron, kie estas mensogo; esperon, kie estas malespero; lumon, kie estas mallumo; unuiĝon, kie estas malpaco; ĝojon, kie estas malĝojo. Dia Majstro! permesu, ke mi ne tiom penu esti konsolata, kiom konsoli; esti komprenata, kiom kompreni; esti amata, kiom ami. Ĉar donante, ni ricevas; pardonante, ni estas pardonataj; kaj mortante, ni naskiĝas por la Eterna Vivo.

Mi proponas alian tradukon de la originala teksto:

Sinjoro, faru el mi ilon de Via paco.
Kie estas malamo, mi alportu amon.
Kie estas ofendo, mi alportu pardonon.
Kie estas malkonsento, mi alportu unuecon.
Kie estas eraro, mi alportu veron.
Kie estas dubo, mi alportu fidon.
Kie estas senespereco, mi alportu esperon.
Kie estas mallumo, mi alportu lumon.
Kie estas malĝojo, mi alportu ĝojon.
Ho, Majstro, mi penu pli
konsoli ol esti konsolata,
kompreni ol esti komprenata,
ami ol esti amata.
Ĉar donante oni ricevas,
sin forgesante oni trovas,
pardonante oni estas pardonata,
mortante, oni renaskiĝas al la Eterna Vivo.

Kvankam Jesuo Kristo ne estas nomata, estas klare, ke "Sinjoro" kaj "Majstro" rilatas al li, ĉar la preĝo estis publikigita de kristana pastro kun la titolo "Bela preĝo por esti farata dum la Meso".

Tamen ĝia enhavo estas ankaŭ fakte teozofia – se ni nur konsideru la jenon:

1. La "Sinjoro" kaj "Majstro" povas esti iu ajn granda Adepto. Ekzemple Kriŝno kaj Budho estas nomataj "Sinjoro". La Mahatmaj estas "Majstroj de Saĝeco".

2. Estas tute **teozofiaj** la jenaj cititaj **sintenoj**:

esti ilo de paco;

alporti amon, unuecon, veron, esperon, lumon, ĝojon;

konsoli, kompreni, ami;

doni, sin forgesi, pardoni.

3. Kelkaj asertoj ne estas tute teozofiaj, sed ni povas interpreti ilin teozofie:

a) En la frazo "Kie estas dubo, mi alportu la fidon", la vorto "fido" verŝajne rilatas al la fido je Jesuo Kristo. Sed ni povas rilati la fidon ankaŭ al la fido je la asertoj de la Adeptoj, kiuj fondis la T.S.

b) La frazo "Donante oni ricevas" ne signifas, ke, kiam oni donas, la celo estu ricevi ion, sed estas klare, ke, se oni donas sen pensi en rekompenco, la rekompenco estas bona karmo.

c) Por la kristanoj ekzistas post la morto Eterna Vivo, en kiu oni renaskiĝas. Laŭ la Teozofio ne ekzistas Eterna Vivo por la homo, sed eterna ciklo de renaskiĝoj. Do ni povas interpreti "Eterna Vivo" kiel "eterna ciklo de renaskiĝoj".

4. La frazo "Pardonante oni estas pardonata" fakte ne estas teozofia, ĉar en Teozofio oni ne estas pardonata simple pro pardoni. Ĉio havas efikon. Se oni faras iun malbonon, okazos konsekvenco (ĉu en ĉi tiu vivo, ĉu en la proksima enkarniĝo). Neniu – eĉ ne la Adeptoj, la Mahatmoj aŭ iu alia alta Estaĵo – povas pardoni niajn erarojn. Sed ankaŭ en ĉi tiu kazo ni povas interpreti la frazon teozofie tiel: Se vi pardonas, vi faras bonan agon, kaj konsekvente vi – ne estos pardonata, sed – ricevos bonan karmon.

La franclingva originalo:

Seigneur, faites de moi un instrument de votre paix.
Là où il y a de la haine, que je mette l'amour.
Là où il y a l'offense, que je mette le pardon.
Là où il y a la discorde, que je mette l'union.
Là où il y a l'erreur, que je mette la vérité.
Là où il y a le doute, que je mette la foi.
Là où il y a le désespoir, que je mette l'espérance.
Là où il y a les ténèbres, que je mette votre lumière.
Là où il y a la tristesse, que je mette la joie.
Ô Maître, que je ne cherche pas tant à être consolé qu'à consoler,
à être compris qu'à comprendre,
à être aimé qu'à aimer,
car c'est en donnant qu'on reçoit,
c'est en s'oubliant qu'on trouve,
c'est en pardonnant qu'on est pardonné,
c'est en mourant qu'on ressuscite à l'éternelle vie.